


# LA SKOLTA MONDO.

*Trimonata revuo*

*Organo de Skolta Esperanto Ligo*



*Volume 5  
N-ro 14*

*Apr-Jun 1979*

# S E L

SKOLTA ESPERANTO LIGO  
Postbus 433  
1500 EK Zaandam Nederlando.  
Poŝtĝirkonto 54 36 47  
\*\*\*\*\*

Fondinto "Avoto", A.W. Thomson.  
Kunfondinto: J.W. Leslie.

Honoraj Prezidantoj:  
Avoto, D.H. Davis, L.J. VanGulek.

Prezidanto: John Berggreen, Brattvoll-  
veien 23c, Oslo 11, Norvegujo.  
Telefono 02-283035

Sekretario: J.K. Hammer, Taxusstraat  
7, 1505 AA Zaandam, Nederlando  
Telefono 075-166931

Kasisto kaj Administranto de L.S.M.:  
David H. Withey, 21 Brookfield Ave.  
Waterloo, Liverpool L 22 3ye,  
Britujo. Telefono 051-928-2936.

Redaktoro: Hans Amund Rosbach,  
Bambleveien 2, 3700 Skien, Norveg-  
ujo. Poŝtkto 3363389, Tel 035-21848.

Membroj de la Centra Komitato:  
Allan Fineberg, 76 Seventeenth  
Ave., Paterson, NJ 07531, Usono.

Ŝindo-Seitaro, Nisi-mikuni-1-  
tyōme 200, Higasi-yodogawa-ku,  
Osaka-si, Japanujo.

\*\*\*\*\*

Skolta Esperanto-Ligo eldonis:

Jamborea Lingvo (lernolibro).

Skolta kaj Tenduma Terminaro.

Jamboreaj Notoj (preparolo de la  
14 ĝisnunaj jamboreoj. Esp. lingva)

Jamboree Story (Sama en angla)

Pli vasta horizonto (informa kaj  
ideo-dona libreto eldonita en la  
lingvoj angla, araba, franca,  
germana, japana, hispana, neder-  
landa kaj norvega.)

## "world scouting"

La lasta numero de nia granda  
kolego el la Monda Skolta Ofi-  
cejo aperis.

Jes - la lasta.

La Monda Komitato faris tiun  
decidon, kaj klarigas ĝin per  
la ekonomio: La amerika dolaro  
malplivaloriĝis, dum la svisa  
franko plivaloriĝis. Kaj nun  
oni bezonas 30.000 dolarojnse  
la gazeto pluenvivu.

Jes, certe la ekonomio estas  
la kaŭzo. Sed oni devus ana-  
lizi la situacion pluen, kaj  
mi mirus, se oni ne inter la  
kaŭzoj ankaŭ trovus la ekstraĵn  
koston pro la dulingveco de  
la gazeto - kiu aperas en la  
angla kaj la franca.

Kaj se oni fakte analizus tion  
eĉ pli, oni certe trovus, ke  
la multlingveco de la tuta  
administrado estas ege multe-  
kosta.

Kaj nenecesa!

Ni konas la solvon! Ankaŭ la  
gvidantoj de la MO konas ĝin,  
ili nur hezitas rekoni ĝin.  
Kial?



Anstataŭ jamboreo - la irana  
politiko ja malebligis ĝin -  
la Skolta Movado nun rekonos  
grandajn skoltokampojn kiuj  
havas internacian membraron  
kiel "Tendaro de la jamborea  
jaro."



Hans Amund

# kiam la suno, luno kaj vento iris al bankedo.

Fabelo el Hindujo.

En iu tago la suno, la vento kaj la luno estis invitata por tagmanĝi ĉe siaj geonkloj, la tondro kaj la fulmo, kaj ilia patrino, unu el la plej foraj steloj kiun vi povas vidi alte sur la ĉielo, restis sola hejme ĝis la reveno de siaj infanoj.

La suno kaj la vento tamen estis frandemaj kaj egoistaj, kaj ili ĝuis la grandan festenon kaj la frandaĵojn sen pensi pri tio, ke ili povus forpreni ion, kion ili povus kunpreni hejmen por sia patrino. Sed la milda luno ne forgesis sian patrinon. El ĉiu frandaĵo per kiu oni regalis, ŝi kaŝis iom sub unu el siaj belaj, longegaj ungoj, tiel ke ankaŭ la stelo ricevu sian parton el la tagmanĝo.

Kiam ili hejmenvenis ilia patrino, kiu dum la tuta nokto atente sidis por tuj vidi ilin per sia klara, malgranda okulo, diris: "Nun, miaj karaj infanoj, kion vi kunprenis por mi?" Tiam respondis la suno, la pli aĝa: "Mi neniom kunprenis por vi. Mi iris por gastigi ĉe bonaj amikoj, ne por havigi manĝaĵojn por mia patrino." Kaj la vento diris: "Ankaŭ mi ne kunportis ion por vi, patrino. Vi apenaŭ rajtas atendi, ke mi konportus kolekton da bonaĵoj por vi, kiam mi eliris por mia propra plezuro." Sed la luno diris: "Alportu teleregon, panjo, kaj vi vidos, kiom mi kunportas." Kaj ŝi skuis siajn manojn, kaj sur la teleron falis tia tagmanĝo, kian oni neniam antaŭe vidis.


Tiam la stelo sin turnis al la suno kaj diris: "Ĉar vi iris por amuziĝi inter amikoj kaj ĝuis ĉion sen pensi pri via patrino, vi estu malbenita. Ek de nun via brilo estos varmega kaj bruliga kaj neeltenebla por tiuj, kiujn ĝi tuŝas. Kaj la homoj vin malamos kaj kovros siajn kapojn, kiam vi aperos."  
(Kaj el tio rezultis, ke la suno ankaŭ hodiaŭ estas tiel varmega.)

Tiam ŝi sin turnis al la vento, dirante: "Ankaŭ vi, kiu forgesis vian patrinon pro viaj egoismaj ĝojoj, aŭdu vian juĝon. Vi ĉiam blovos dum varmaj, sekaj tagoj, kaj vi sekigos kaj ŝrumpigos ĉion, kio havas vivon. Kaj la homoj ek de nun malamos vin kaj abomenos vin."  
(Kaj el tio la fakto, ke la vento ankoraŭ nun estas tiel malagrabla dum varma vetero.)

Sed al la luno ŝi diris: "Ĉar vi, mia kara filino, memoris vian patrinon kaj pensis pri ŝi, kaŝante iom el tio, kio estis por via propra buŝo, por ŝi, ek de nun vi ĉiam estos malvarmeta, milda kaj klara. Neniu bruliga brilo akompanos viajn purajn radiojn, kaj la homoj vin nomas benata."  
(Kaj pro tio la brilo de la luno ankoraŭ nur estas tiel milda kaj malvarmeta kaj agrabla.)

La supra fabelo estis rakontata al anglo de maljunega hinda infanvartistino. Ĝi ja ne kaŝas, ke ĝi naskiĝis sub tre varmaj regionoj. Oni diras, ke Hindujo estas la vera hejmlando de la fabeloj.





Korektigo de Ko Hammer:

Pioniroj de SEL:

Kun intereso mi legis en "La Skolta Mondo" n-ro 13, ke nia prezidanto John Berggreen kalkulas min inter la pioniroj de SEL. Malprave, tamen.

Ĉar mi naskiĝis en 1928 mi nepre estis tro juna por aliĝi en 1930! La ĝustaj faktoj: skoltiĝis en 1946, esperantistiĝis 1950, aliĝis al SEL en 1956, kaj mi estas la sekretario de post mia unua Universala Kongreso en Bruselo 1960.

Cetere: pri la antaŭa hungara NR Pal Balkanyi mi supozis, ke li antaŭ nelonge mortis. Kaj nepre menciinda en la listo estas George Rust, pri kies aktivecoj tamen aliaj homoj pli bone povas informi vin.

Deziras korespondi:

1. MONTAGNER Giovanni, via D. Chiesa 14, I-30024 Musile di Piave (VE), Italujo.

2. BORTOLETTO Silvano, via S. Giovanni 3, I-30024 Musile di Piave (VE), Italujo.

Ambaŭ estas 15 jaraĝaj skoltoj kiu volas korespondi kun samĝaj geskoltoj pri skoltismo.

Ni ricevis

revuon "Vidu" januaro 1979.

Tiu revuo aperas laŭbezzone en la E-3 laboro kiun gvidas J. Tuinder. E-3 signifas: Esperantistoj Esperigas Esperantojn kaj celas al la laboro inter esperantistoj por sendi okul-

kuracano helpon al Afriko.

Kiu deziras pliajn informojn por pli aktive partopreni per helpe aŭ mono, skribu al E-3, Henegouwenlaan 35, NL-1966 RH Heemskerk, Nederlando.

Ni - kiel ofte - ricevis ankaŭ invitojn al kongresoj kaj aranĝoj en la komenco de la somero, sed ricevis la leterojn post redaktado de la unua numero. Kaj nun jam tro malfruas! Sed "Monda Turismo" de TEJO eldonis "Turisman Esperanto-Kalendaron 1979", kiu bone informas pri preskaŭ ĉio. Ni diras "preskaŭ", ĉar ni vidis ke ĝi estas nekompleta. Mem ni trovas, ke la kongreso de la kristanaj esperantistoj - KELI - ne estas rubrikigita.

Kolektanto estas nomo de revuo aperanta en Bulgario. La revuo, kiu jam aperas dum 8 jaroj, montriĝas riĉenhava kaj interesa. Iom timigas min ke artikolo pri kolekto de ovoj povas aperi sen iu komentario pri la granda danĝero ekstermi kelkajn birospecojn!

Kolektanto estas nomo de revuo aperanta en Bulgario. La revuo, kiu jam aperas dum 8 jaroj, montriĝas riĉenhava kaj interesa.

Iom timigas min ke artikolo pri kolekto de ovoj povas aperi sen iu komentario pri la granda danĝero ekstermi kelkajn birospecojn!



Imagu pri kio mi revas! Mi revas, ke mi povus sidi hejme ĉe la fajro kaj revii pri ĉi tio!

La Universala Kongreso en Svisujo estos renkontejoj ankaŭ por SEL-anoj. La diskutotemo por la kunkveno estos la organiza plano de SEL.

Nova Esperanto-prospekto.

La Turisma Oficejo en Nancy, Francujo, ĵus eldonis novan 10-paĝan ilustritan prospekton tute en Esperanto, kaj vi povas ricevi ĝin senpage ĉe la Turisma Oficejo, 14 Place Stanislas, F-54000 Nancy, Francujo. Nancy estas bela kaj interesa urbo en Nord-orienta Francujo kun muzeoj kaj monumentaro.

Poŝtmarkoj.

The Scout Stamps Collectors Club, kio estas La Klubo de Kolektantoj de Skoltaj Poŝtmarkoj, ĵus eldonis 16-paĝan kontrolliston de ĉiuj skolt/skoltinaj poŝtmarkoj kiuj aperis de 1900 ĝis



1977  
(inklu-  
zive.) La  
listo

donas kaj la daton kaj la kialon por la eldono, kaj aldonas la nombron de la poŝtmarkoj en ĉiu kompleto. Ĝi ankaŭ enlistigas lapoŝtmarkojn de ĉiuj arabaj ŝtatoj, propagandajn kaj lokajn markojn k.c., kaj estas tre utila eldonaĵo por ĉiuj kolektantoj de skoltaj kaj skoltinaj poŝtmarkoj. La listo estas havebla ĉe Peter J Duck, 59 Gilpin Crescent, Whitton, Middelsex TW2 7BP, Anglujo, kontraŭ 40 anglaj pencoj.

Skolta kampo en Pollando.

En la tagoj 3.a - 20.a de julio okazos en Bialistoko - ĉe pitoreska lago, la 4-an Internacia Skolta Esperanto-Tendaro. La partoprenantaj nacioj mem prizorgas programon al kampfajro, kaj oni aranĝos ekskursojn sur kanaloj kaj lago, tra nacia parko (kun uroj!), en

la urbo - naskiĝurbo de Zamenhof - kaj al postglaciaga regiono. La tri lastajn tagojn oni pasigos en Varsovio.

Al alvenantoj el okcidentaj landoj frua aliĝo estas rekomendita, tiel ke oni povas liberigi vin el la deviga monŝanĝo perede la pola ambasadejo.

Skribu al:

Zwiazek Harcerstwa Polskiego, Komenda Chorągwi, w Suwalkach, ul 22 Lipca 16 Pollando.

Malnovaj Esperanto-Gazetoj. Pola sinjoro, Edward Tadeusz Wojtakowski, skribas al ni:

Por prilaborata "Enhavobibliografio de Esperantaj periodaĵoj 1887-1978" ĉiuj -speciajn malnovajn Esperanto-gazetojn serĉas Edward Wojtakowski, P. O. kasto 312, PL 50- 950 Wroclaw 2,

Pollando.

Rekompenco per poŝtmarkoj, Esperanto-libroj k.t.p.

Lingvistikaj aspektoj.

UEA eldonis libron pri la internacia lingvo kaj ties loko inter la multaj naciaj lingvoj. La aŭtoro, d-ro John Wells, bazigas la 76-paĝan libron sur serio de prelegoj en la kadro de Internacia Somera Universitato.

Glumarko.

UEA ankaŭ eldonis glumarkon okaze de la Internacia Jaro de la Infano.

Ili havas la oficialan emblemon de la jaro, kaj estas havebla en folioj po 8 markoj.

# INTERSTELAJ FLUGOJ — KIAM KAJ KIEL?

En la historio de la tekniko aperas revoluciaj eltrovoj, kiuj ne estas malpli ŝtormovekaj ol la revolucioj en la politika historio. La teknika novaĵo, kiu preskaŭ dum la nokto ŝanĝas kompletajn agadsferojn de la homa vivo, kiu ebligas aferojn rigardatajn dum cent- kaj mil jaroj kiel fantastaj kaj neeblaj, samgrade entuziasmigas la revulojn kaj la seriozajn sciencistojn: en la societo aperas nesupozata optimismo kaj kredo je la scienco.

La samo okazis ankaŭ kun la kosmaj flugoj. Eĉ kvar jaroj ne forpasis ek de la ekflugo de la unua »Sputnik«, kaj jam komencis flugi en la kosmo la unuaj kosmonaŭtoj. La kapturita vetkurado en la kosmon ricevis neatenditan impulson: ĉiu jaro surprizis per la faktoj, kiuj antaŭnelonge apartenis al la scienca fantaziaĵo. La homa kreopovo ŝajne ne konas limbarojn, kaj per teknikaj eltrovoj oni serĉas eliron el ĉiuj malfacilaĵoj kaj solvon de ĉiuj problemoj.


Sed la optimistojn rapide atingas malvenkoj kaj amara seniluziigo. Post la fulmorapida, eksponenciala kreska elano, sekvas plentrankvilo kaj stagno. La potencialoj de la revolucia eltrovo elĉerpiĝis, kio atingis sian perfektecon, tio praktike restas en tiu stato sen ŝanĝoj dum tutaj jarcentoj. Tion pruvas multaj ekzemploj. Dum neplena sesdek jaroj la rapido de aviadiloj kreskis de 16 km/h (la aviadilo de fratoj Wright el la jaro 1903) al 3331,5 km/h (la amerika »Lockheed« el la jaro 1965.). Pli ol ducentoble! Sed estus vera mirindaĵo, se tiu rapido daŭros ankaŭ en la estonteco. La evoluo de la aviadiloj praktike finiĝis kaj ni povas atendi nenian pli gravan perfektigon de l' aerŝipoj.

Pro ĉiuj ĉi faktoj ne devas nin tro surprizi la optimismo de Arthur C. Clarke, unu el la plej konataj verkistoj de la science-fantazia literaturo, kiu en la sesdekaj jaroj — do dum la plenforta eksvingo de la »astronaŭtika revolucio« — antaŭvidis, ke jam en la jaro 2020 la unuaj aŭtomatsondoj direktiĝos al plej proksimaj steloj, por ke en la jaro 2080 komenciĝu la erao de l' interstelaj flugoj kun la homa kosmoŝipa anaro. Hodiaŭ, kiam ni jam bonege enpaŝis en la »kosman eraon«, oni povas pli sobre kaj pli mature prijuĝi tiajn antaŭvidojn.

La problemoj kiujn renkontos la vojaĝonto renkonte al steloj, neniel estas simplaj, kaj malpleje facile solveblaj. La interstelaj flugoj estus sensecaj, se la kosmoŝipo ne estus atingonta la rapidon tre proksiman al tiu de la lumo — do, la plej grandan rapidon, kiu estas ankoraŭ fizike ebla. Por atingi tiom fantazian rapidon (300 000 km/h), la kosmoŝipo devus apliki tre longdaŭran akceladon. Ne estas malfacile elkalkuli, ke la ŝipmotoroj devus funkcii atingante la akceladon egalan al tiu de la tergravito (do, temas pri la plej granda akcelado, kiun povus la homo elteni dum pli longa tempo) preskaŭ en la daŭro de unu jaro! Jam tiu postulo ŝajnas por niaj teknikaj mezurskaloj fantazie ekscita: la nuntempaj motoroj funkcias apenaŭ kelkajn minutojn, kaj nun venas postuloj, pri la funkciado dum semajnoj kaj monatoj.

La dua problemo estas konvena brulmaterialo. Kompreneble, tute for-  
 jetenda estas la aplikeblo de la klasika kemia mova forto, ĉar tio aspektus  
 preskaŭ kiel transatlantika navigado en la bankuvo. Kaj eĉ la nuklea  
 brulmaterialo estas tre malforta. La antaŭkalkuloj montras, ke la nuklea  
 rakedo sur la starto devus pezi centmilionoble pli ol sur la celo, se ĝia  
 akceliĝo egalus al lumrapido. La dektuna kosmoŝipo postulas ŝarĝportan  
 rakedon, kiu pezus minimume miliardon da tunoj!

La solvo de tiu problemo estus serĉenda en la apliko de ankoraŭ pli  
 fortaj brulmaterialoj. La teorio, nome, montras, ke la proporcio inter la  
 brulmateriala maso kaj utila ŝarĝo estas despli kontentiga, ju pli grandas  
 la rapido de korpuskloj elirantaj el ajutoj. Necesas, do, uzi kiel eble  
 pli rapidajn korpusklojn, kaj la plej rapidaj en la naturo estas la fotonoj.  
 La fotona mova forto, forto per la lunkorpuskloj aŭ alia elektromagneta  
 radiado, posedus la plej kontentigan (kaj teorie kaj praktike) proporcion  
 inter la komenca kaj fina maso de la »kosma komponaĵo«. Sed ĉi tie na-  
 kiĝas alispeca problemo. Ne estas malfacile elkalkuli, ke tiam por ĉiu gramo



Vizio de la malprosima estonto: iam en estonto (— ni esperu, en sufiĉe baldaŭa  
 estonto!) kosmaj ŝipoj estos direktataj al malproksimaj steloj. La supra bildo  
 montras tian fantaziecan vizion de la estonto, kiam la kosma ŝipo — malproksi-  
 me de nia sunsistemo — komencos alproksimiĝadi al la aliaj stelaj mondoj en  
 la senfina kaj senlima kosmo

de la starta rakedpezo foruziĝus la forto de 3 milionoj da vattoj de la rakedmotoro. Tiu forto pli ol centmilionoble superas la specifan forton de la nuntempaj rakedoj, kies ĉiu gramo de la starta maso ne kontribuas al la tuta forto pli ol kelkajn centonojn da vatto! La solvo estos eble ekuzo de la antimaterio kiel la rakeda brulmaterialo, sed pri tio paroli nun, kiam ni pri la antimaterio scias tre malmulte — estas ankoraŭ tro frue.

La ideo, kiun matematike prilaboris Bussard en la jaro 1960 fakte estas alloga eliro el tiuj malfacilaĵoj. La ideo je la unua rigardo ŝajnas absurda: uzi la interstelan gason kiel rakedan brulmaterialon! Kvankam la kosma spaco estas vakuo pli vaka ol la plej vaka senaera spaco ricevita en la Teraj laboratorioj, ĝi tamen enhavas proksimume 1 atomon da hidrogeno en la kuba centimetro (nekredeble malgranda kvanto: unu gramo da hidrogeno troviĝas en la kosma spaco de 600 milionoj da kubaj kilometroj, kaj la hidrogeno estas bonega termonuklea brulmaterialo. Kaj pro la fakto, ke la kosmoŝipo flugas treege rapide, ĝi povus kolekti multe da tiu kosma gaso. Sed la antaŭkalkuloj tamen montras, ke la kosmoŝipo devus kolekti la tutan hidrogenon en la radiuso de 400 kilometroj ĉirkaŭ si. Kiel efektiviĝi tion — al tiu demando la nuntempa scienco kaj tekniko ne trovas gustan respondon.

La plej vastajn perspektivojn prezentas, ŝajne, la ideo — principe simila al la «recepto» de Jules Verne por la veturo al la Luno — nome, ke la interstela ŝipo estu puŝota tra la kosma spaco. Laŭ tiu koncepto de sur la Terio estus direktotaj fortaj laserradioj al la kosmoŝipo, kies malantaŭa flanko estus provizota per spegulo. Reflektataj de la spegulo, la fotonoj, laŭ la Newtona leĝo de ago kaj reago, puŝus la rakedon en la dezirata direkto. Sed tie ĉi per si mem altrudiĝas tre simpla problemo: kiel efektiviĝi tiel precizan direktadon de la lumradio al tiel granda distanco? Tio eble estus solvebla per apliko de laseroj, kiuj emanadus radiojn de pli kurte ondolongo (— aŭ gama-laseroj), sed — hodiaŭ ankoraŭ ekzistas nek tia lasero nek tia spegulo.

Ne malpli grava ol la mova forto estas la problemo, kiun prezentas la danĝero de kunpuŝiĝo. Eĉ la plej eta kosma polvo kiu flugas per rapidoj proksimaj al tiu de la lumo, posedas nekredeblan detruan forton. La duongrama kineta meteorenergio egalas al unu kilotuna energio de la nuklea bombo! La nura ekfrapo de la kosmogasaj korpuskloj kaŭzas traflon de 20 kilovattoj je ĉiu kvadrata centimetro, trae de la rakedosupraĵo, kaj tiu forto estas centmilionoble pli granda ol la forto de la sunradio sur la tersurfaco. Kiel defendi sin kontraŭ tio — ankaŭ por tiu problemo la nuntempa scienco ne trovas solvon.

Ĉu estas eblaj la interstelaj flugoj? Oni ne estu tro granda pesimisto, sed ankoraŭ malpli oni devas esti optimisto kiel Clarke. La interstelaj flugoj — se ili estas eblaj — apartenas al malproksima estonto. Ili tute certe ne estos naturaj, kaj ankoraŭ malpli estos rutina daŭrigo de la ĝis tiam aplikata enrompo en la kosmon, sed ili rezultos el la teknika revolucio ne pli malgranda ol tiu, kiu forkondukis la homon en la kosmon. Kiel aspektos tiu revolucio — tion ni povas nur konjekti.

Ing. Nenad Raos, kunlaboranto de la Observatorio  
(kun permeso el "Homo kaj kosmo".)



# KANADO

## savis la totem- arton de pereo

Multaj skoltoj konatiĝis kun la totemkolonojn en la libroj de Karl May, Gustave Aimard, James Cooper aŭ aliaj verkistoj de rakontoj pri Indianoj. Tiuj strangaj, minacantaj, grimacaj figuroj staris iam apud la indianaj loĝejoj, kaj ankaŭ en la sovaĝejoj ĉirkaŭ la vilaĝoj. Sajnis fantaziaj gardostarantoj, kiuj kaŭzis nekomfortan sentadon ke ili kontrolas la fremdulojn.

Oni povas trovi multajn totemkolonojn en Kanado, sed multaj kuŝas putrante sub la tero. Feliĉe ĝustatempe oni povis savi kelkajn belegajn ekzemplerojn de la putriĝo. Ekspertoj riparis ilin, kaj poste uzis ĥemiajn rimedojn por konservi ilin.

La totemkolono ekestis en la sudo de Alasko kaj en la nuna kanada provinco Brita-Kolumbio. Aliloke vivantaj triboj imitis ilin en la sekvanta tempo. La totemkolonojn ne estis idoloj. Ili estas bildoj de "blazonoj" kaj de fragmentoj el la historio - aŭ pli ĝuste la pasinto de la posedanto. Li eble estas granda viro, aŭ tribo, klano, familio aŭ alia grupo komune posedas ĝin.

Oni faris kaj ĉiam faras la totemkolonon el trunko de la ruĝa cedro la ornamaj figuroj, kapoj, simboloj, staturoj k.t.p. estas ankaŭ rilate al la vico ligitaj al rigoraj reguloj, sed la artisto estas sufiĉe libera je kiu formokiu li elektas. Preskaŭ ĉiu 'totempalo' estas historia, legenda aŭ mito-

logia "bildrakonto" en lignaj figuroj. Nur la posedanto(j) kaj la ĉeestantoj dum la enaŭguro plene komprenas la figurojn. Tiun enaŭguron ordinare akompanas tribo-dancoj.

Longtempe la etnologoj pensis, ke la totempalo estis ege antikva indiana proprajo. Nun oni scias, ke ĝi ekzistas nur dum du jarcentoj. Eble ili naskiĝis el la kutimo ornamati la kolonojn de la loĝejo per skulptaĵoj. Kaj kelkfoje oni metis totempalojn apud tomboj de ĉefoj aŭ aliaj granduloj. Kelkfoje oni enterigis iujn en ĉerkojn ornamataj per skulptataj totememblemoj. En la komenco la totemskulptisto havis nur primitivajn ilojn kaj simplajn kolorojn. La laboro plifaciliĝis kaj plidelikatiĝis kiam la blankuloj venis kaj alportis ĥakilojn kaj bonajn tranĉilojn. Pli poste venis koloroj, kiuj ne korodiĝis. Tiam la arto de la totempalo pligraviĝis.

Pli ofte oni bildigas la fenikson kaj la aglon, kaj ofte tiuj pompas supre. La fenikso kun kurbega beko estas la simbolo de multaj triboj laŭ la bordo de la Silenta Maro. Oni pensis, ke ĝi estas kuriero de la tondro, kaj ke ĝi jetas la fulmon per sia beko. Ankaŭ la aglo multe aperas en la historio kaj la legendoj de multaj triboj kaj gentoj. Oni ofte portretas ĝin kun etenditaj flugiloj, simbolo ke ĝi - kaj la alligita tribo - regas la landon. Sed ankaŭ aliaj bestoj funkciis kiel totembesto. Krome oni skulptis fenomenojn kiel tertremo, ĉielarkoj, steuloj kaj glaciegoj en la totempalo.

Pra-totemoj, la ornamaj paloj de la indianaj domoj, nur malofte estas konservitaj. Laŭdire nur du, sur insuloj Regina Charlotte ĉe la marbordo de Brita Kolumbio. Sur tiuj paloj estas klaraj la blazonoj de kelkaj gravaj indianaj gentoj.

Kelkaj indianaj triboj - ekz. Haĭdaj - faras krom totempalojn ankaŭ belegajn kestojn ornatitajn de totemsimboloj por ujoj por siaj posedadoj. Antaŭe ili eĉ manĝis el ornatitaj teleroj el cedra ligno. La Haĭdoj ankaŭ faris totememblemojn el mola ardezo, kaj tiaj ardezaĵaj figuroj kaj pipoj estis tre serĉataj.

Kompreneble la indianoj nun ne plu sin okupas pri la totem-arto. Ankaŭ ili eniris la modernan mondon. Tamen la kanadaj aŭtoritatoj enoficiĝis kelkajn indianajn artistojn por savi ĉion sav-eblan.



# Drako



El la angla "Scouting" ni tondas:  
Sankta Georgo kaj la drako. Ludo por la lupidoj.

Kiam la lupidoj ludas ĉi tion, duono de la grupo estas virginoj kaj duono la brava Sankta Georgo. Ili staras ĉe la muroj en ambaŭ flankoj de la ĉambro. En la mezo estas la drako.

Ĉiu Sankta Georgo nun devas kuri trans la ĉambron por savi virgulinon, porti ŝin reen sur siadorso kaj reveni al sia celo sen esti tuŝata de la drako. Kiu estas tuŝata, fariĝas virgulino, kaj ambaŭ reiras al la loko de la virgulinaj. Ĉu vi sukcesas savi multajn virgulinajn?

Poste oni interŝanĝas, tiel ke la alia duono povas provi la taskon de bravaj Sanktaj Georgoj.

# ĜOJO?

Estis granda festotago. Preskaŭ du cent gejunuloj kolektiĝis por kun ĝoji, kune danci, paroli, manĝi, trinki.

La horoj pasis, jam estis nokto, nur la luno donis iun lumon. Sed la festo de la gejunuloj daŭris ĝis la tago denove ekbrilis en la oriento.

Tiam la gejunuloj hejmeniris.

Sed la loko de la subĉiela festo? Ho, ve - abundis la restaĵoj. Papero, duonmanĝitaj kolbasoj - kaj, plej malbone, miloj da akraj vitropecoj pro frakasitaj boteloj! Montinde - junuloj nepre devus scii sin amuzi sen malpurigi la naturon. Aŭ ĉu oni ne povas esti gaja sen frakasi ion?

Ni tuj vidas kaj komprenas la malbonon.

Sed ekzistas ankaŭ alia parto de la naturo, parto, kiun ni ne povas vidi. Ni nomas ĝin la animo.

Ankaŭ ĝin ni povas malpurigi - aŭ peni konservi pura.

Ofte, tamen, iuj deziras esti gajaj, - deziras ĝoji kune kun aliaj homoj. Kaj tre, tre ofte ankaŭ tia kunesto finiĝas nur kiam la naturo - la animo - estas plene kovrata per malpuraĵoj. Kaj ankaŭ inter tiuj malpuraĵoj estas tiaj, kiuj povas krei novajn akcidentojn, kaj kiuj estas malfacile forigeblaj.

Ĉu oni do ne povas esti gaja sen krei tiajn ruinojn? Ĉu oni ne povas trovi iun plezuron sen frakasi - sian animon?

Kiel profitas homo, kiu gajnas la tutan mondon, sed perdas sian animon?

Klarigoj al la suba bildo.

El ligno vi faru keston kiu povas esti sufiĉe granda por enhavi ĉe 60 metrojn da nigra akvotubo por akvumi la ĝardenon.

Vi metu tiun en cirkloj sed nur en unu tavolo. Unu finon vi kombinu kun la fluanta malvarma akvo.

En la alia fino estu la krano el kiu viprenu la varman akvon.

La keston vi bone kovru interne per moderna izolilaĵo, kaj supre estu vitra kovrilo.

Ideo el "Scouting".



## VASTAJ HORIZONTOJ

La kajero jam aperis en la lingvoj:

angla  
franca  
germana  
hispana  
japana  
kataluna  
nederlanda  
norvega

Eldonoj itala kaj sveda estas preparataj.

Mendu ĉe via NR aŭ ĉe S.E.L.,  
postbus 433, NL 1500 EK ZAANDAM.

Prezo: Ned. gld. 1.50 (por 10  
ekz. aŭ pli po ned gld 1.00.



- Aŭstrio f-ino Eva-Marie Fraunhofer, Badenerstr 7, A-2512 Tribuswinkel/Baden pr. Vieno.  
s-ro Franz Schwärzler, Rathausstrasse 2, A-6900 Bregenz.
- Belgujo s-ro L.J. VanGulck, Lt.Lippenslaan 33 bus 10, B-2200 Borgerhout.  
Poŝtk.to Belga Skolta Esp.Sekretario 000-0327460-85. Tlf 031-3688.08
- Brazilio s-ro Adonis Marcelo Saliba Silva, caixa postal 192, 35130 Acesita Mj.
- Britujo s-ro David H Withey, 21. Brookfield Ave, Waterloo, Liverpool L 22 3ye.
- Danlando s-ro Bjarke Nielsen, Erdalsvej 30, DK-2600 Glostrup.
- Finnlando s-ino Irja Klemola, Nunna, SF-20660 Littoinen.
- Francujo s-ro Patrick Deveughele, 53 Av de Rigny, Appt 64, F-94360 Bry sur Marne.
- Germanujo s-ro Rudolf Fischer, G Adolfsstrasse 2, D 4401 Nordwalde.
- Hispanujo s-ro S.Aragay Galbany, Bassegoda 40-3-1, Barcelona 14. Tel 333 80 81.
- Irlando s-ro Frank Dobbs, 8 Ailesbury Grove, Dublin 4.
- Italujo s-ro Fr. Abriani, Via Falconetto 24, I-37100 Verona. Tel 045-525173.
- Japanujo s-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K.16, Suekirotyo Kitatu, Osaka.
- Kanado s-ro John H.F. Hoyle, Box 421, Forest Ont.  
Helpa NR: s-ro Paul Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro, Queb.
- Madagaskaro s-ro Roger Randrianekena, P.P. - Box Postale 14, Ambatondrazaka
- Nederlando s-ro B.J. Wijmer, Vreebos 41, Zoetermeer/2280. Tel 079-215868. Poŝtkto. 3335470.
- Norvegujo s-ro H.A.Rosbach, Bambleveien 2, 3700 Skien. Tel 035-21848. Poŝtkonto 3 36 33 85

- Peruo s-ino J. de Skotte, Melecon Paul Harris 335/200 Barranco-Lima 4.
- Portugalujo: s-ino Maria Teresa Nunes Constância, Rua Freixo Capitaó 16-2<sup>o</sup> Dto, Agualva - Cacem.
- Svedujo s-ro Ragnar Ragnar Hjorth, Kronobergsgt 25, S-11233 Stockholm.
- Svislando: S-ro Erik Otte, Ecole d'Humanité, CH-6082 Goldern (Hasliberg)
- Usono: S-ro Robert W Rapp 2043 Brannon S W, Austell GA 30001. Tf 404-948-8535
- Informoj pri membreco:

En landoj kun Nacia Sekcio: Informiĝu ĉe NR kaj pagu al li la kotizon.

Individuaj membroj (nur en landoj sen N.R.): Kotizo inkl. abono:  
Junuloj ĝis 18-jaraj: Ned. gld. 3.30 aŭ egalvaloro.  
Pliaĝuloj: Ned. gld. 5.00 aŭ egalvaloro.  
Subtenantoj: Minimume Ned. gld. 5.00 aŭ egalvaloro.

Prefere pagu la kotizon al la kasisto: David H. Withey, 21 Brookfield Ave, Waterloo, Liverpool L 22 3 ye.

Adresoj de la Centra Komitato: Vidu la duan paĝon.

Konstanta adreso de S.E.L.: Postbus 433, Zaandam, Nederlando.

\*\*\*\*\*

La Skolta Mondo estas la oficiala revuo de Skolta Esperanto Ligo, kaj aperas kvarfoje en la jaro. Kontribuajtoj estu sendataj al la redaktoro, Bambleveien 2, N 3700 Skien, plej malfrue ĝis la 10.a de februaro, majo, aŭgusto aŭ novembro.

Ekspedanto de la gazeto estas la kasisto. Informu al la Nacia Reprezentanto je malĝusta adreso, nericevo k.s. Se NR ne estas en via lando, informu al la ekspedanto.



**LA SKOLTA MONDO** REDAKCIO: Bambleveien 2  
N 3700 Skien.

NEISSN 0037 6558

